NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobilbao@terra.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MARTO/APRILO 2007 **Nro. 69 (2/07)**

ASAMBLEA GENERAL

Tal y como establecen los Estatutos de nuestra Asociación, se convoca a todos los socios a la Asamblea General que tendrá lugar el próximo **VIERNES 18 DE MAYO**, a las **19,30 h.**, en la sede social del Grupo Esperantista de Bilbao (Barrencalle Barrena, 7-1º Dcha.).

ORDEN DEL DÍA:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Idem, del resumen de gastos e ingresos del año 2006.
3. Idem, del presupuesto para el año 2007.
4. Nombramiento de una nueva Junta Directiva.
5. Ruegos y preguntas.

GENERALA ASEMBLEO

Tiel kiel postulas la Statutoj de nia Asocio, ni kunvokas ĉiujn ĝiajn membrojn al ĝenerala kunveno, kiu okazos la **VENDREDON 18an de MAJO**, je la **19,30 h.**, en nia sidejo de Bilbao (Barrencalle Barrena, 7-1a Dekstre).

TAGORDO:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la proptokolo de la lasta ĝenerala asembleo.
2. Same, pri la ens- kaj elspezoj de la jaro 2006.
3. Same pri la bugeĝo por la jaro 2007.
4. Nomumo de nova estraro.
5. Demandoj kaj sugestoj.

LOKE ...

KURIOZA ANEKDOTO.

En la jaro 1933-a, kunlabore kun UEA, oni organizis en Bilbao E-kurson por infan-instruistoj de naciaj lernejoj. Gxin partoprenis 5 instruistoj kaj estis gvidata de Víctor O. Allende. Estis premioj por 3: vojagxo al Kolonjo (Germanio). Ni memoru ke, en tiu epoko, Hitlero jam regis Germanion.

Tiam, en Bilbao, tramoj ne havis fiksitajn haltejojn, sed homoj levis la manon kaj la stiristo haltigis la tramon. Do, en Kolonjo, niaj samurbanoj same faris: ili levis la manon por haltigi tramon. Ege surprizitaj, la sxoforo bruege bremsis la tramon, cxiuj pasagxeroj levigxis kaj cxiuj, kun la brako levita, komencis entuziasme krii: "¡¡Heil Hitler!!".

(Rakontis nia amiko Eduardo Larrouy)

PAGO DE CUOTAS ATRASADAS.

Si a la izquierda de estas líneas ves una "X", es porque aún no has hecho efectiva tu cuota de socio del Grupo correspondiente al año anterior (2006). Por ello, te rogamos que subsanes tu olvido y la hagas efectiva, cuanto antes, en la cuenta habitual del Grupo. El número de cuenta, así como el importe de las cuotas, figuran en la cabecera de esta circular. Muchas gracias por tu apoyo.

VENONTAJ KONGRESOJ.

- 92-a Universala Kongreso. Ĝi okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007 en Jokohamo (Japanio).
- 93-a Universala Kongreso. En la jaro 2008, en Roterdamo (Nederlando), la urbo kie troviĝas la sidejo de Universala E-Asocio.
- 7-a kongreso de Eŭropa E-Unio, la 1-a post Bilbao. En maribor (Slovenio), de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007.
- 66-a kongreso de Hispana E-Federacio. 5/8 de julio 2007, en Palos de la Frontera (Huelva); kune kun la kongreso de Andaluzia E-Unuiĝo. Pro proksimeco al Portugalio, oni atendas la alvenon de portugalaj samideanoj.
- 93-a Universala Kongreso. Roterdamo (Nederlando). 2008.

HISPANA KONGRESO.

Informoj pri kotizoj, hoteloj, ktp pri la **Hispana Esperanto-Kongreso 2007,** en Palos de la Frontera (Huelva), ekde 5a ĝis la 8a de julio vi trovos ĉe:

http://congreso.esperanto-andalucia.org (hispane) kaj
http://kongreso.esperanto-andalucia.org (esperante)

(NIA VOĈO. Organo de madrida E-Liceo. Aprilo 2007)

SUBVENCIO AL HEF-GRUPOJ.

La Estraro de HEF aprobis en la buĝeto 2007 konton de 500 eŭroj por subvencii al la esperantaj grupoj membroj de HEF. La celo de la subvencio estas partopreno en foiroj aŭ ekspozicioj. Limdato: la 30an de Novembro 2007. Pli da informoj en www.esperanto.es

(NIA VOĈO. Organo de madrida E-Liceo. Aprilo 2007)

KURIOZAĴOJ

La Teatro Español, en Madrido, prezentas la teatraĵon **"Homebody / Kabul"** de Tony Kushner. Tie aperas kelkfoje Esperanto: iu rolulo parolas ĝin kaj pri ĝi. Ankaŭ, en la broŝuro de la teatraĵo oni parolas pri Esperanto. Ĝi videblas ĉe la ttt-paĝo: http://www.homebody-kabul.com.

Rigardu tie "Glosario". Pedro Hernández diras ke antaŭ kelkaj monatoj oni kontaktis lin por traduki la tekstojn kaj instrui la aktorojn, sed post tiu unua kontakto oni ne plu kontaktis lin. Iu scias kiu faris la laboron? La estraro de la teatro akceptis disdoni al spektatoroj diversajn flugfoliojn pri esperanto provizitajn de Madrida Esperanto-Liceo.

(NIA VOĈO. Organo de madrida E-Liceo. Aprilo 2007)

URBESTRO DE MADRIDO, ESPERANTISTO.

Mi jhus enretigis artikolon, kiun mi estis verkinta antaŭ paro da jaroj en la bulteno de Hispana E-Federacio, pri esperantisto kiu estis relative grava hispana politikisto: prezidanto de la socialista junularo, direktoro de la ĉefa socialista partio, deputito en la unua respublikana Parlamento, kaj fine urbestro de Madrido. Lia nomo estis Cayetano Redondo, kaj li estis mortpafita tuj post la fino de la milito (kaj poste preskau forgesita ĝis nun).
La artikolo trovighas en http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/redondo.htm.

Mi ankaŭ tradukis ĝin en la hispanan:
http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/cayetanoredondo.htm .

Vi povas vidi fotojn de lia tombo en la retejo de iu familiano: http://madrid1936.es/mifamilia/cayetano.html

(Toño del Barrio. Madrido)





TOMÁS APRAIZ RIBERAS (Bilbao, 1915-1999) CECILIA GUTIÉRREZ GÓMEZ (Santurce, 1911-Valencia, 2001)

En nia vojaĝo tra la historio de la E-Grupo de Bilbao, pere de ĝiaj aktivuloj, alvenis la vico de Tomás Apraiz, sed tiel ke ni ne povas imagi lin sen la "ombro" de lia amata edzino Cecilia, jen ankaŭ eta omaĝo al ŝi.

Parolante pri Tomás Apraiz, la unua penso, kiu venas al nia kapo estas ke ni referencas pri tre bonkora homo: neniam ĉagrenita, neniam unu vorto pli laŭta ol alia, ĉiam preta helpi la aliajn, ĉiam preta labori por lia amata Grupo en kiu ajn laboro.

Li eklernis Esperanton en la kurso 1933/34. Estis amiko de frato de Eduardo Larrouy kaj estis tiu, kiu alparolis pri la ĵusa esperantistiĝo de Eduardo; tiel ekrilatiĝis Tomás kun la movado.

Li edziĝis kelkajn tagojn antaŭ ol lia foriro al la fronto dum la hispana milito, kie batalis ene de bataljono organizita de la socialisma sindicato UGT. Havis la eblon spekti Gernikan bruliĝanta, sed ne suferis ĝian bombardadon; post la milito, estis enkarcerigita en koncentrejo en Ekstremaduro.

Tomás estis unu el tiuj bilbaoanoj, kiuj post finiĝo de la milito kaj malpermeso de Esperanto, komencis kuniĝi por paroli dum promenis cxirkaŭ la "Nova Placo" de Bilbao. Inter ili, Cecilio Olalla, José Asenjo kaj Pedro Alcedo.

Hejtisto, li laboris en Eibar, kie kontaktis kun Santiago Arizmendi, Prezidanto de la tiea grupo kaj ĉefa propagandisto de Esperanto en tiu urbeto; la hispana kongreso de la jaro 1953, organizita de bilbaoanoj, estis fermita en la Magistrato de Eibar, kie la urbestro faris tre favoran prelegon al Esperanto.

Dum multaj jaroj, li estis delegito de UEA en Bilbao, estrarano de la loka grupo (de Prezidanto ĝis voĉdonanto) kaj partoprenis multajn hispanajn kongresojn. Ĉiam preta helpi en kiu ajn poresperanta evento, ni memoras lian senlacan laboron dum la hispana kongreso de la jaro 1989 en Bilbao, la lasta kiun li spertis en nia urbo. Neniam gvidis kursojn, cxar preskaŭ ne havis la eblon ĉeesti lernejon, tiel ke devis labori ekde infanaĝo; ofte li diris ke "lernis la hispanan gramatikon danke al lernado de Esperanto". Alia tipa frazo lia estis ke "li ne parolas, sed pafas", ĉar parolis tiel rapide ke, de tempo al tempo, malfacilis kompreni liajn vortojn.

Kaj apud li, ĉiam lia ege parolema kaj simpatia edzino, ĉiam preta rakonti pri iliaj malfacilaj travivaĵoj kaj preta akcepti la novajn gelernantojn, al kiuj donis apologian prelegon pri la utileco de Esperanto kaj pri la bonkoreco de ĝiaj parolantoj, malgraŭ ke ŝi neniam kapablis paroli eĉ unu solan vorton. Sed ŝia entuziasmo lumigis nian sidejon.